



LA VERDA  
LUPEO  
FENIKSO



---

N-ro 56

1/1982 Marto

13a jaro

---

**Redaktoro:**

Rudolf Burmeister

DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30

---



## ELF-AREK

Esperanto Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Koletaktantoj

<b>Kluba informilo:</b>	La verda lupeo/Fenikso aperas kvaronjare
<b>Redaktoro:</b>	Rudolf Burmeister, DDR 9047 Karl-Marx-Stadt, W.-Firl-Str. 30
<b>Prezidanto:</b>	Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3 UEA-konto: 6295. Poŝtkonto: 51 57 85-4
<b>Stampobanko:</b>	Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4
<b>Kotizo por 1982:</b>	15 maldekstre stampitaj novaj IRK aŭ 36 skr pagendaj al s-ro Paulsson.
<b>Amikoj en soc. landoj:</b>	Eblas pagi per Esperantajfoj. Necesas nepre antaŭa interkonsento. Ni ne akceptas poŝtmarkojn.

---

### Grava atentigo pri E-stampoj:

Se vi prizorgas novajn E-stampojn, nepre lau valida tarifo, (povas esti la minimuma por sendi poŝtaĵon) afranku la kartojn aŭ kovertojn. Preskaŭ senvalora estas ekz. koverto afrankita kun pm de 0.10 aŭ 0.50, se minimuma tarifo estas 3.50.

### Bonvenon al niaj novaj membroj:

Tage R. Olsson,

Vitabandsvägen 13, S-302 40 Halmstad

s-ro Taiei Nakai

Motosiro-cho 19-22, Fuzinomiya-si, 418 Japanio

M. Michel Paquis

8, rue Gabriel Pelletier

Cheminon, F-51250 Sermaize les Bains

Reverendo Ryôkû Yûhan

Hônen - Comunidade Budista

Caixa Postal 690

BR-24 000 Niteroi,RJ, Brazilio

Interŝanĝas, aĉetas kaj vendas neuzitajn poŝtmarkojn (nur en "kvaroj"/"kvarblokoj") por helpi al lepruloj pri temoj: ŝako, bestoj, faŭno, flaŭro, naturo aeroplanoj, balonoj, ŝipoj, fervojoj, transporto, UPU, medicino, skoltismo, Esperanto k UNO. Nur post reciproka interkonsento!

34a  
ESPERANTO Kongreso  
de IFEF  
Balatonfüred

Majo 1982

LA RELO KUNLIGAS LANDOJN  
ESPERANTO LA POPOLOJN

INTERNACIA JARO



POR HANDIKAPITOJ

## Materialoj por E-filatela ekspozajo

Pluraj niaj klubaj geamikoj petis pri publikigo de listo da filatela materialo, kiun oni povus vicigi en E-filatelan kolekton kaj kiu utilis por ekspozajo. Tiun deziron eblas plenumi, sed en tute provisoro formo. Tiun ĉi liston ni daŭrigos en sekvontaj niaj informiloj. Kiam eblas, ni aldonas katalognumerojn surbaze de Yvert. Necesus, ke iu el ni detale okupiĝu pri ĉi problemoj kaj ŝajne estas bona ŝanĉo, ke ĝi 1986 aperos bona materialo el plumo de Vladimir Vana k.a. amikoj. Nia nuna listo helpu al li en la preparado de tiu materialo kaj al niaj geamikoj, intertempe akiri iom da materialo, kiu apartenas nepre al bona ekspozajo pri internacia lingvo.

A) Longa estas la vico de sciencistoj tra la jarcentoj, kiuj okupiĝis pri kreo de internacia, aŭ komuna, lingvo. Ni citu kelkajn el inter ili, pri kiuj ni konas filatelan materialon. Vi ĉiuj povas kompletigi tiun liston.

Platon, greka filozofo, skribis "La Dioj favorus la homaron, se ili donacus al ĝi komunan lingvon (E-pk de GDR K sta)

Galen, medicina scienculo, konstruis sistemon de signoj por preciza komunikado de diversaj ideoj. (E-pk de GDR K sta)

Francis Bacon, angla filozofo, (1561–1626) ellaboris skemon de universala lingvo (Rumanio 1799, E-pk GDR k sta)

Descartes, (1596–1650) skribis "arta lingvo estas ebla . . .". (F 341/342, E-pk GDR, sta)

Newton, angala fizikisto, (1642–1727) ellaboris projektojn por universala lingvo. (F 1136, PL 1001 k.a.)

Comte, (1798–1857) skribis pri neceso de universala lingvo (Francio 1121)

Leibniz, filozofo, (1646–1716) postulis k ellaboris universalan lingvon (sta k E-pk de GDR, pm: . . .)

Comenius, filozofo (1592–1670) profetis 1641 en libro "Via Lucis" universalan helpan lingvon (CS 1769)

Zefaniah, profeto (VII jc a.n.e.) aŭguris redonon de unu komuna lingvo al la homaro (Biblio, Zefania, ĉap. 3. v. 9)

Nostradamus, (Michel Notre-Dame) profetis 1555 en sia verko "Centuries" aperon de ova kultura lingvo. (. . .)

Campanella . . . . .

Quintillianus, roma pedagogo (nask. 0035) parolis pri lingvo komuna por ĉiuj. (gestoj) (. . .)

Atheneis, greka retoro, (vivinta ĉ. 200) skribis pri "fingra lingvo" (. . .)

Voltaire, franca filozofo, (1694–1778) revis pri universala lingvo (F 854, R 82 k.a.)

Ampere, franca fizikisto (1775–1836) kreis sistemon de universala lingvo (F 310, 845)

Proudhon, franca filozofo, okupiĝis pri internacia lingvo (1808–1865) (F 799)

Do, karaj geamikoj, mi pensas, ke vi ĉiuj povus kompletigi tiun liston kaj mi rekomendas al vi studi esperantologiajn verkojn, kie troviĝas abundo da uzebla materialo. Ekz. en tiu "Historio de la mondolingvo" de Drezon.

Sekvontfoje mi prezentos al vi duan parton kun famaj Esperantistoj kaj amikoj de Esperanto, el kiuj mi nun citu al vi: Ramsay, Suttner, Renn, Jonas, Vela Piskova, div. papoj, Einstein, Diesel, Oswald, Tagore, Perrosi, Barton, Tuwim, Ciolkovski, Tolstoj, Gorki, Kato Haman, Rolland, ktp ktp.


En nian materialon ni ankaŭ povos envicigi verkistojn, kies verkoj estas tradukitaj en Esperanton, sed tiu listo fariĝus senfine longa kaj tial mi proponus listigi nur la plej konatajn kiel ekz. Hašek, Madach, Sienkiewicz, Homer, Goethe, Shakespeare ka.a. Kompreneble en tiu tri parto ni devus citi ankaŭ ekz. La Biblion, La Koranon.

Mi bone scias, ke kelkaj niaj klubaj geamikoj opinias, ke tiuj materialoj ne apartenas al la E-filatelato. Tamen, inter ni ankaŭ estas multaj, kiuj filatele dezirus dokumenti la historion kaj la evoluon de la internacia lingvo Esperanto, kaj tiam certe necesas tiu materialo. Kaj tial la tasko de ni informilo devas esti, doni utilajn informojn al ĉiuj. Mi estas certa, ke ni kolektantoj povos grave kontribui al la ekspozicioj en la centjaro de Esperanto. Ni kreu la bazon por tiu laboro kaj la necesajn helpilojn jam nun, ankoraŭ sufiĉe frue.

LEUVEN – EKSPozICIO DE  
ESPERANTO



18-19-20 DE SEPTEMBRO 1937  
PALACO DE BELAJ ARTOJ  
EKSPozICIO ORGANIZITA DE  
« LA NOVA TAGIĜO »  
SEKcIO DE FLANDRA LIGo ESPERANTISTA



## Italaj E-tutaĵoj

Nia amiko Werner Simon en sia lasta letero al la redaktoro inter alie mencias tutaĵojn el Italio, pri kiuj ni jam atentigis parte en nia informilo nro 42. Hodiaŭ denove resume pri ili: Ekzistas du poŝtkartoĵoj kun privataj surprisoj (kategorio C) kun nominaloj de 120 kaj de 130 liroj. Plie ekzistas unu poŝta koverto (Biglietto) kun nominalo de 120 liroj. Tiujn tutaĵojn aperigis la loka filatela klubo de urbo Montagnana okaze de filatela ekspozicio "Centenario Esperanto". Tiu ekspozicio okazis 13an kaj 14an de majo 1978.

## 46-a Germana Infanvilaĝ-Balonflugo

Kiam nia amiko Straif en sia letero skribis pri la trovo de la aŭstra E-pk kun enpresoj pri la 46-a (aŭstra) balonpoŝtflugo, mi memoris pri letero de nia amiko Rikardo Hirsch el FRG, kiu siatempe aldonis fotokopion pri karto pri la 46a germana balonpoŝtflugo profite al infanvilaĝo. Unuamomente mi pensis, ke ambau identas, ĉar ambaŭ estas la 46-aj. Sed montriĝis, ke ne estas tiel, ĉar la germana balonpoŝtflugo okazis 1.1.80. Mi ne scias, ĉu nia presejo bone kapablas prezenti la fotokopion kaj tial mi ĝin priskribas:

Startloko estis la komunumo St. Silvester kaj surteriĝloko la komunumo Plaf-feten (aŭ simile) en Svislando. Aŭfrankita la karto estas kun la svisa E-pm. Sur tiu karto ankaŭ estas enpresita, ke temas pri la 20-a Novjarflugo, krome ni trovas sur ĝi la konatan balonpoŝtan stampon kun la teksto:

Balonpoŝto/Varmaera balono/HB-BEO/Esperanto

La karto estas numerigita, ĝi havas numeron 3235, do sufiĉe alta eldonkvanto, ŝajne.

Niaj specialistoj do jam povas aranĝi balonpoŝtan rubrikon en la E-filatelo, ĉar ankaŭ en Pollando jam okazis balonpoŝtaj flugoj lige kun E-stampoj. (Sta Poznan-foiro 1967) Vidu ankaŭ JU 18 de la INEKSCASOFILA en Novi Sad 1967. Sed tiu lasta estas verŝajne ege rara. Eĉ siatempe tiu stampo apenau estis havebla. Kaj ĉu tiu jugoslava stampo vere apartenas al la E-temaj, pri tio mi persone ne estas konvinkita.

## Ekspozicio en Budapest

Niaj klubaj geamikoj Radnai kaj Fekete sendis informojn kaj materialojn pri granda ekspozicio, kiun okazigis la Filatelista Esperanto Klubo de Budapest okaze de la 15-jara ekzisto en la biblioteko de la MABEOSZ-sidejo. (MABEOSZ = Asocio de hungaraj filatelistoj). Tiu ekspozicio funkciis de la 11a de decembro ĝis la 16a de decembro 1981 ĉiutage de la 13a ĝis la 18a horo. Oni montris materialojn pri diversaj aspektoj de la Esperanto-movado:

- El historio de la Esperanto-movado
- Esperanto en komunikado kaj sur poŝtmarkoj
- La Esperantostampoj de Hungario, Pollando kaj Hispanio
- Esperanto-movado por la paco
- Esperanto-glumarkoj
- Bildkartoĵoj pri popolaj kostumoj.

Tereza kaj Vilmos Radnai montris en tiu ekspozicio ekzemple 144 foliojn kun diversaj Esperantoglumarkoj kaj nia klubo amiko Fekete la stampojn kaj poŝtmarkojn. Sinjoro Fekete estas la prezidanto de tiu E-klubo, kiu estas registrita en MABEOSZ.

Pro la altaj kostoj ne eblis mendi poŝtan stampon, sed tamen la organiza komitato preparis eldonon de kartoĵoj kun memoriga surpriso kaj de sambildaj glumarkoj. (Tiujn vi povas aĉeti ĉe s-ro Radnai Vilmos, Dunaharaszti, pf 40, H 2331 apud multaj aliaj pasintjare aperintaj en Hungario).

Ni kore gratulas al niaj klubaj geamikoj Fekete kaj Radnai, kiuj grave kontribuis al la preparo de tiu ekspozicio.

## Givoje rakontas pri JU-stampoj

"La rimarkoj pri la stampo de la UK en Beograd 1973 estas ĝustaj. Apud la oficiala poŝta stampo kun diametro de 30 mm ekzistas dua pli granda. Tiu estas nepoŝta. La prezidanto de LKK posedis tiun kaj li stampis kelkajn kovertojn per ĝi en verda inko. Do, nepre temas pri nepoŝta stampo.

Kaj nun pri la stampo de Rijeka: Estis mi, kiu vendis dum la kongreso kovertojn kun tiu poŝta stampo. Ekzistas presitaj nigraj stampoj sur okazaj kovertoj, kiun eldonis la lokal filatela klubo kun permeso de la poŝto. Sed la stampo ankaŭ estis en la manoj de LKK por povi mem stampi kovertojn kaj kartojn. Jen klarigo: nur tre malofte la poŝto sendas oficiston al kongresejo por stampi. Estas normala en nia lando, ke la poŝto disponigas la stampilon al la mendintoj kun la ordono, ĝin redoni post kongreso. En Rijeka okazis, ke ne estis stampokuseno kun nigra inko, sed nur en verda, tial oni stampis en verda, tio ne estas "oficiala", tamen stampilo estis poŝta. Verdaj stampoj estas nur kelkaj."

## Arnhema dulinia stampo

"Mi daŭre opinias, ke mia dulinia stampo de la E-domo en Arnhem estas poŝta kiel jam plurfoje dirite al vi ĉar pri poŝteco pedas:

- la literformo de M en DOMO samkiel en NE 4
- la viola koloro de la inko

En "Fenikso" nro 52 nia amiko D. Bartoŝik pritraktas tute alian *privatan* dulinian stampon, kiun mi ankaŭ havas (verda) sur letero tiam sendita al la E-domo. Sur tiu ĉi estas "radianta E-stelo" kaj vortoj (ned.) tute ne ekzistantaj sur mia, miaopinie poŝta dulinia stampo. Necesus kompari tiun de Bartoŝik kaj la mian. – Amouroux –"

Kara Dolfa Bartoŝik: Bonvolu ankoraŭfoje okupiĝu pri la afero. Mi ricevis fotokopion de tiu dulinia, fakte tiu M en DOMO plene egalas al la M en la katalogita stampo. Certe estas malfacile, bone memori la aferon post 50 jaroj. Sed eble ni tamen solvos la aferon, ĉu dediĉi al ĝi katalogan rangon aŭ ne.

## La brazila mistero!

En numero 54 mi notis en stampo-suplemento pri BRA, ke 15.12.1980 (!) en Sorokaba laŭdire estis uzita stampo APE-Concurso. Ĝi estas notita en listo pri brazilaj E-stampoj, kiun kompilis sinjoro Rodrigues, nia kluba membro. Bedaŭrinde ĝis nun mi ne vidis tiun stampon, nur tiun noton en la listo. Tial momente ne eblas, daŭrigi numerojn de brazilaj stampoj. Mi esperas, ke sinjoro Rodrigues ankoraŭ trovos tempon, sendi priskribon de tiu APE-Concurso-stampo al la redaktoro.

## Neĝviro kun pispoto

Denove nin E-filatelistojn salutis okaze de la jarfino hungara esperantista neĝoviro kun pispoto sur la kapo pere de la plej freŝdata hungara Esperantostampo. Oni ĝin uzis okaze de la interesa Vintra Esperantista Ferio 11-a. Nia kluba amiko Fekete sendis al la redaktoro salutkarton kun tiu stampo datita 28.12.81.

La aspekto de la stampo estas la sama kiel la pasintjara VEF-stampo, oni nur ŝanĝis unu ciferon: de 10- oni faris 11-a. Dankon ankaŭ al nia kluba amiko Radnai, kiu disponigis vicon da fotokopioj pri hungaraj stampoj, inter ili pri 10-a VEF.

## Afrankstampoj de Esperanto-Centrum

Montriĝis, ke la afrankstampo numero 22, priskribita en nia informilo numero 53 ne estas sola, sed havas gefratojn! Jam en numero 54 nia amiko Mikaelo Legris atentigis pri ili. Dank' al sinjoro Leon de Brujne, vicprezidanto de Monda Turismo, mi nun eksciis, ke tiu afrankstampa familio subite duobligis pro la translokiĝo de la Esperanto Centrum en Antverpeno el la Arsenalstraat en la Frankrijklei, kion nature oni notis en la afrankstampo de la afrankmaŝino numero F 3640.

Jen la priskribo:

AS 22-1	1980/81	Antwerpen	ESPERANTO-CENTRUM Arsenaalstraat 5, B 2000 Antwerpen
AS 22-2	1981	Antwerpen	sama, kun Frankrijklei 140
AS 23-1	1980/81	Antwerpen	ESPERANTO-PANORAMA Tweemaandelijks tijdschrift Arsenaalstraat 5, B 2000 Antwerpen
AS 23-2	1981	Antwerpen	sama, kun Frankrijklei 140
AS 24-1	1980/81	Antwerpen	l'Esperanto en Marche Tweemandelijks tijdschrift Arsenaalstraat 5, B 2000 Antwerpen
AS 24-2	1981	Antwerpen	sama, kun Frankrijklei 140
AS 25-1	1980/81	Antwerpen	JEN/KONCIZE Tweemandelijks tijdschrift Arsenaalstraat 5, B 2000 Antwerpen
AS 25-2	1981	Antwerpen	sama, kun Frankrijklei 140

Tiuj afrankstampoj konsistas el tri partoj: dekstre valorstampo, meze datstampo kaj maldekstre informstampo. La teksto en la flandra (aŭ flama?) lingvo signifas: dumonata ĵurnalo. JEN/KONCIZE estas la organo de la Flandra Esperantista Junulara Asocio, ESPERANTO-PANORAMA la organo de la Flandra Esperanto Ligo. l'Esperanto en Marche ŝajne la organo de la Association pour l'Esperanto, ligita al la Belga Esperanto Federacio.

Heinrich Heine  
(1797-1856)  
estis la unua  
aŭtoro, el kies  
verkoj oni  
tradukis en  
Esperanton.

Togo de la  
Esperanto-Libro  
1981



## Tago de la Esperanto-Libro 1981

Okaze de tiu tago oni en Leipzig reuzis la stampon GDR 9, pri kiu ni skribis en nia informilo nro 52 kaj ankaŭ montris tie ĝian bildon. Validas la sama kiel antaŭ jaro dirite: la poŝtistoj plene fuŝlaboris kaj la stampo, almenaŭ mia ekz. apenaŭ estas legebla. La ĉefpoŝtejo do vere ne kontribuas al bona reputacio de la Germana Poŝto en GDR. Krome, mendinto de tia reklama stampo volas ion propagandi k pagas sufiĉe da mono al la poŝto por la stampilo, sed se la rezulto estas tiel mizeraspekta ni proponas ke la mendinto almenaŭ repostulu sian monon.

## GDR-E-pk 22

La plej freŝdata E-pk de GDR, aperigita okaze de la Tago de la Esperanto-Libro 1981, aspektas multe pli simpatia, ol tiu ĝin akompananta poŝta maŝinstampo. La poŝta karto montras la alpreson kun teksto:

"Heinrich Heine (1797–1856) estis la unua aŭtoro, el kies verkoj oni tradukis en Esperanton."

Plie oni montras reproduktaĵon de la "Libro de Kantoj – Heinrich Heine" el la 10-spesdeka Biblioteko Esperantista, eldonita 1911 de la Esperanto-Propaganda-Instituto Leipzig. Kun la aserto pri Heine la eldonintoj pravas, tion mi kontrolis helpe de la "Enciklopedio de Esperanto". La Unua Libro de Esperanto estis tiu lernolibro por rusoj, kiu enhavis "tradukon el Heine".

## Diversaj 300-Din. de Trieste?

Unu el niaj klubanoj nun akiris 2 tricentdinarajn E-pm de Trieste. Ili estas malsamaj kaj en koloro kaj en papero. Eble niaj specialistoj pri jugoslavaj poŝtmarkoj ion povas diri pri tio. Kiu havas eblecon, konsulti specia51-katalogon?

Kompreneble ni scij nun akiris 2 tricentdinarajn E-pm de Trieste. Ili estas malsamaj kaj en koloro kaj eble unu el ambaŭ dum pli longa tempo kuŝis ekz. sur skribotablo? Bonvolu direkti viajn sciojn pri la afero al la redaktoro.

## ELF/arek-ekonomio

Okazis unuafoje en la vivo de nia klubo, ke ni ne havas deficiton. Jen la kasraporto de Ivar Paulsson:

	Enspezoj	Elspezoj
91 membroj pagis kotizon/ofte ne plene		3276 skr
Donacoj		200
Enspezoj de stampo-banko		365
Preso de la informilo 4x500 skr	2000 skr	
afranko de informilo 4x250 skr	1000	
Kotizo al UEA	155	
Afrankelspezoj de la prezidanto	100	
Afrankelspezoj de la redaktoro	100	
	<hr/>	<hr/>
	3355	3841
En la kaso	486	
	<hr/>	<hr/>
Sume	3841 skr	3841 skr



## PRI AS 21 – Zeist

Unue mi atentigu pri tio, ke en la strato Zamenhoflaan de la urbo Zeist en Nederlando ekzistis almenaŭ du entreprenoj, kiuj uzis afrankmaŝino (numero FR 15883/AS 15 kaj PB 3286/AS 21). Ambaŭ stampojn ni jam priskribis en nia informilo numero 53. Pri AS 21 la delegito de UEA sinjoro R. slot skribis al la redaktoro i.a.:

"Kiel mi jam supozis, la instituto transloĝiĝis al alia kvartalo. Temas pri la fondaĵo "Nationaal Instituut voor onderwijs en wetenschappen" (Nacia Instituto por Instruado kaj Scienco). Nun la sidejo troviĝas en Boslaan 6. La "matrikulo" kun indiko "Zamenhoflaan" ili devis redoni al la poŝto kaj ricevis novan kun indiko "Boslaan". Kovertoj aŭ kartoj kun afrankstampo de Zamenhoflaan 12 ne plu estas troveblaj. Mi mem ne posedas ĝin, ĉar mi ne kolektas filatelaĵojn."

## Simon pri AS 21

En Fenikso 53 vi miras pri aspekto de AS 21 el Zeist, ĝi estas tute en ordo, ĉar ĝi estas produkto de la firmao Pitney Bowes, kies afrankstampoj nature aspektas alie ol tiuj de la germana firmao Francotyp, kies produktoj estis AS 15 kaj AS 17.

— Simon —

## AS 26

Estis denove sinjoro Mikaelo Legris, kiu sendis la unuan informon pri ĝi per la sciigo "Mi posedas afrankstampon de Brasschaat kun la teksto TK-Stafeto" (Vidu numeron 54). Intertempe li sendis originalon al la redaktoro. Temas pri vere tre bela afrankstampo. Dekstre situas la valorstampo kun la indiko pri numero C 2285. En la mezo situas la datostampo kun indiko pri la urbo Brasschaat kiu havas poŝtan kodiciferon 2130. Maldekstre ni trovas la por ni interesan parton kun la simbolo de TK-STAFETO kaj floro, kies esperantan nomon mi ne konas, en germana lingvo ni diras "leonodonto" kaj infanoj nomas ĝin "blovo-floro". Ankaŭ ni trovas indikon pri la adreso de tiu Esperanta eldonejo de Torben Kehlet: Miksebaan 65 A, B 2130 Brasschaat, Belgio.

Ni estas tre kontentaj, ke nun ni povas vicigi afrankstampon de tiu eldonejo en nian katalogon. Jam en nia informilo numero 45 ni montris afrankstampon de Torben Kehlet, sed "ne sufiĉan" por eniri katalogon. Tamen eĉ tiu estas uzebla en filatela ekspozajo kaj specialistoj inter ni sciu pri ĝi. Eble post kelkaj jaroj ĝi eniros katalogon, ĉar la opinioj pri filatelaj leĝoj ŝanĝas kiel jarsezonoj.

## La mistera AS en FRG

Sur la paĝo 8/54 en nia informilo en la suba parto troviĝas iuj spuroj pri afrankstampo. Mi povas certigi al vi, ke mi mem ne scias, pri kio temas. Tamen mi supozas, ke nia presejo provis montri iun novan el Paderborn. Certe iu el niaj klubanoj ankoraŭ sendos informon al la redaktoro, tiam ankaŭ niaj klubaj geamikoj ekscios, pri kio temis!



## Miskpoto Draveil/Cerny/Perpignan malmikspotiĝis

Dankon al ĉiuj niaj klubaj geamikoj en Francio, kiuj unuanime opiniis, ke "Draveil 1981 ne estas reuzo de Cerny 1979", kiel skribis ekz. nia amiko Amouroux, kaj kiu ankaŭ argumentis: "rimarku ankaŭ la malsimilan literon E en la stelo apud la malsama urbonom".

Sekve nun la decido estas facila: Ambaŭ havos sian propran numeron kaj la listo nun aspektas tiel:

45	Cerny	1979
46-1	Perpignan	1981
46-2	Perpignan	1981 (kun P.P. en ds)
47	Draveil	1981

La abundo da variaĵoj ĉirkaŭ la maŝinstampo Perpignan konfuzis unuamome la redaktoron, kiu levis senhelpe la manojn. Estis nia amiko Amouroux, kiu montris la ĝustan vojon kaj li skribis:

"En la aŭgusta numero (1981) de "Messages", oficiala franca poŝtista revuo estas dirite, ke, principe, asterisko anstataŭ horindiko en francaj rondaj stampoj akompanantaj mekanikan varbtekston estis, dekomence, oficeja sed nun ĝeneraligita uzo por poŝtaĵoj enpoŝtigitaj antaŭ la 24a horo sed post la kolektado de enpoŝtigitaj poŝta - ĵoj la koncernan tagon.

Unuvorte temas pri poŝtnuligo de Poŝtaĵoj, kiuj tamen forvojaĝos nur la sekvan tagon.

Sekve de tio ŝajnas al mi, ke vi devas katalogi la francajn varbstampojn konsiderante nur la situon kaj tipan prezenton de la ronda datstampo. La tipa datstampo havu iun katalognumeron kaj la ceteraj tipoj de la datstampo, inkluzive la P.P., havu iun subnumeron en la koncerna numero.

Pri variaĵoj (manko de iuj eroj, renversoj ktp ...) vi resendu al koncerna piednoto".

Do, mi nun denove relative klare povas superrigardi la aferon de la francaj E-stampoj. Kompreneble por ni E-filatelistoj ne tiom gravas la datstampo en maŝinstampo, sed ĝuste la tekstoparto en la maŝinstampo. Sed tion ni ne levu al problemo. Grave estas, ke ni en nia informilo pritraktu ĉiujn detalojn ĉirkaŭ stampo, post 50 jaroj niaj posteuloj ne plu kapablos bone solvi iujn eksternormajn aperaĵojn. Certe iuj numeroj de nia informilo transvivos, kaj eblas konsulti nian informilon, kiu, kvankam sufiĉe mankohava, tamen kapablas transdoni utilajn informojn.



Internationales  
Esperanto Messetreffen  
Leipzig, 12.-14. 3. 1982

## Rumanaj Esperantostampoj

Estis nia hungara amiko Stefano Fekete el Budapesto, kiu fine de la jaro 1981 afable disponigis al la redaktoro fotokopiojn pri la pasintjare aperintaj en Rumanio poŝtostampoj. El tiuj kopioj ni ĉerpis sube priskribitajn faktojn.

La stampoj aperis okaze de "La IV-a tutlanda Esperantologia renkontiĝo" en Timisoara (18–20.9.1981). Inicatis ilin, kaj ankaŭ memorigan koverton la filatela klubo de la universitato en Timisoara, kiu ŝajne ankaŭ organizis ekspozicion pri Esperanto en la universitato. Certe niaj estimataj klubanoj en Rumanio ankoraŭ sendos detalojn pri la afero.

**R 1** estas maŝinstampo kun dekstra tekstoparto, kiu portas la tekston:  
a IVa INTILNIRE REPUBLICANA de Esperantologie  
TIMISOARA 18–20.9.1981


La tekstoparto montras plie malfermitan libron kaj E-stelon. La mezuro de la tp: 53x23. La teksto en la datstampo (ds) havas nekutiman pozicion, ĝi kuŝas kvazau sur maldekstra ŝultro. La dato en mia kopio: 19098122 kaj la indiko pri la loko: OF. TIMISOARA TRANZIT

**R 2** same estas ms kun dekstra tp kiu tekstas:  
Vizitati EXPOZITIA TEMATICA Esperanto  
UNIVERSITATEA TIMISOARA 14–20.9.1981

La tp plie montras konturon de pm, malfermitan libron kaj E-stelon. La mezuro estas la sama kiel ĉe R 1 kaj ankaŭ la pozicio de la teksto estas la sama. La indiko pri la ekspeda poŝtejo diras: 1909 TIMISOARA OF. Tranzit. La dato: 19098122. Interese estus scii ĉu la cifero antaŭ loko estas poŝtkoda aŭ data ĉar ambaŭ estas identaj.

**R 3** estas nuliga memoriga poŝta stampo kun diametro de 42 mm. En la stampo aperas granda E-stelo kaj, verŝajne, bildo pri la universitato kie okazis "A IV-A INTILNIRE REPUBLICANA de ESPERANTOLOGIE". La dato sur mia fotokopio: 19.9.1981 kaj la urbo: TIMISOARA.

Gratulon al niaj geamikoj en Rumanio!




### ANONCO

Kiu povos helpi min kompletigi la kolektojn de la publikaĵoj, FILATELISTA ADRESARO, TUTMONDA KOLEKTANTO, LA ESPERANTA KOLEKTANTO, k.t.p., per vendo aŭ interŝanĝo de mankantaj numeroj?.

– Sro. Ramon Molera – Sta. Joaquina no 13 – Moià (Barcelona) – Hispanio.

ESPERANTO LINGVO DE PACO KAJ AMIKECO



FILATELISTA  
ESPERANTO-  
KLUBO

EKSPOZICIO, BUDAPEST  
11.-16. 12. 1981.

ESPERANTO  
B E L A K T U A L A  
S I M P L A



DE JANEIRO  
1 JUN  
TARD  
934  
SEC

1 RIO DE JANEIRO  
CIDADE DE TURISMO  
RIO DE JANEIRO  
TURISMA URBO

2 AGENCIA POSTAL TELEGRAPHICA  
FEIRA DE AMOSTRAS  
INTERNACIA SPECIMENA FOIRO  
DISTRICTO FEDERAL  
- BRASIL -

3 12<sup>a</sup> FEIRA INTERNACIONAL DE AMOSTRAS  
AGENCIA POSTAL-TELEGRAFICA  
POST-TELEGRAGENTEJO  
RIO DE JANEIRO  
SPECIMENA • FOIRO



4 9<sup>a</sup> ABRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO  
RIO DE JANEIRO  
BRASIL  
NOVEMBRO 1936



5 DUA SUDAMERIKA KONFERENCO PRI RADIKOMUNIKOJ  
RIO DE JANEIRO  
JUNIO 1937



6 INTERNACIA FILATELIA EKSPOZICIO  
BRAPEX  
BRAZILA POSTO  
RIO DE JANEIRO 1938



9 13<sup>a</sup> INTERNACIA  
SPECIMENFOIRO  
- 1940 -  
RIO DE JANEIRO  
BRAZILA POSTO

8 12<sup>a</sup> INTERNACIA EKSPOZICIO  
RIO DE JANEIRO  
1939  
BRAZILA POSTO



10 1949 - 1940  
JARCENTO DE LA POSTMORO  
FILATELIA EKSPOZICIO.  
Minas Gerais-Brazilo.



7 UNUA JUNECA EKSPOZICIO FILATELIA  
R. HORIZONTE BRAZILIO  
1938 - JUNIO

